A gauche, Eva Pechova (de Tchéquie) reçoit le 3^{ème} prix espéranto des mains de Petr Dulak, ambassadeur de Tchéquie en France. A droite, Ingrid Berglund (de Suède) reçoit le 1^{er} prix espéranto des mains de Didier Loison, vice-président d'Espéranto-France. Le lendemain, 23 novembre, une deuxième réunion a eu lieu dans les locaux de l'École Normale Supérieure avec l'aide des espérantistes de l'école. 60 personnes ont écouté les lectures de poèmes faites par les jeunes eux-mêmes, en français et en espéranto. Le concours 2019 est maintenant ouvert. Il est possible d'écrire plusieurs poèmes. Outre la participation au concours principal, en français et en espéranto, il est

possible d'écrire 3 poèmes sur les thèmes suivants, en français ou en espéranto :

- l'engagement (Prix Charles de Gaulle)
- être femme aujourd'hui (Prix Simone Veil)
- l'humour (Prix Jean Anselme)
- les droits de l'enfant
- Dis-moi dix mots
- Vivre avec

Les poèmes doivent être envoyés avant le 1^{er} avril en français et avant le 30 avril en espéranto. On peut trouver toutes les informations et l'inscription sur le site www.poesie-en-liberte.fr ou en écrivant à gillestabard.pel@gmail.com

Gilles Tabard



Franca Esperanto-Instituto

EK AL LA TRIAGRADA EKZAMENO!

Ekde 2008 ekzistas Esperanto-ekzamenoj laŭ KER-sistemo por 3 niveloj (B1, B2, C1) el la 6 ekzistantaj. La KER-ekzamenoj taksas la kapablojn uzi la lingvon.

La FEI-ekzamenoj taksas aliajn fakojn rilate Esperanton. Pri movado, pri kulturo, pri historio. Estas antaŭvidita sesio de la triagrada ekzameno (Atesto pri Supera Lernado) en novembro 2019 en Parizo, do iom post la lerneja jaro 2018/2019.

La lasta sesio okazis la 10an de decembro 2017. Tri homoj partoprenis el kiuj du sukcesis: Claude BENSIMON kaj Abdel NOURI. Gratulon al ili !

La kvar legendaj libroj por tiu ekzameno estas:



- *Ne ekzistas verdaj steloj*, de Liven Dek mikronoveloj kun suplemento



- *Viktimoj*, de Julio Baghy. Klasika romano, kun streĉa intrigo pri amo kaj morto en siberia militkaptitejo. Mejloŝtono en la evoluo de la Esperanta prozo.



- *Zamenhof-strato*, de Roman Dobrzyński Interparoloj kun la nepo de la kreinto de la lingvo Esperanto.



- *La bona lingvo*, de Claude Piron Elokventa pledo por la riĉeco de la parolata Esperanto, surbaze de psikologiaj, stilaj kaj sociaj konsideroj

La libroj estas haveblaj ĉe la libroservo de Espéranto-France. Bonan legadon !

Claude Nourmont

Kongreso

KELKAJ IMPRESOJ PRI LA TRI-LANDA KONGRESO EN ZWEIBRÜCKEN, OKAZINTA PENTEKOSTE 2018

Estis trilanda kongreso kun la partopreno de la franca, germana kaj luksemburga asocioj kaj gastoj el aliaj landoj. Malmulte da francoj, malgraŭ najbareco (nur 50 el ĉ. 200 partoprenantoj). La luksemburga partopreno: ne-multaj homoj (sed se ni kalkulus proporcie al la loĝantaro, estas

certe la plej granda !), kaj la luksemburga asocio surpris la organizon de la ekskurso kaj ĉiĉeronado en la citadelo de Bitch. Imponaj libroservoj (minimume 5!) okupis plurajn salonojn. Surprizo: la ĉefa salono jam havis la nomon de esperantisto: la Reinhard-Selten-aŭlo estis nomita laŭ la nobelpremiito kaj

esperantisto, kiu mem iam prelegis en la altlernejo de Zweibrücken. Bongustaj manĝaĵoj, provizitaj de bonnivela manĝoservo, sed atendvicegoj... Iom da improvizo en diversaj eroj, sed ĉio solviĝis en bonhumoro... kaj la kongreso plaĉis!

Claude Nourmont



EKSKURSO AL PIRMASENS

Sabate la 19-an de majo estis organizita buseskurso al la najbara urbo Pirmasens. La urbo situas je 25 km de Du-Pontoj (Zweibrücken), ĉe la okcidenta rando de la "Palatinata Arbaro". Kvankam ne tiom da ŝuoj estas produktataj en Pirmasens hodiaŭ kiel siatempe, la urbo daŭre estas grava loko por la internacia ŝufabrikado. Krom la plej malnova fabriko de ŝuoj en Germanio (Peter Kaiser) troviĝas en Pirmasens la centroj de iuj aliaj konataj ŝumarkoj, ekzemple *Kennel & Schmenger*, *Semler*, *KangaROOS* aŭ *Bugatti*. Ĉe alveno en la busa stacio de Pirmasens, nian grupon akceptis la du gvidantoj de la urbo, kiuj emeritiĝis sed plezure gvidas turistojn. Nia grupo estis dividita en du, la germanparolantoj kun unu gvidanto kaj la aliaj kun la dua gvidanto. Tradukis nia akompananto Martin Thorenz kiu mem loĝas en Pirmasens. Ek al longa pieda vizito tra la urbo!!! Ni ne forgesu, ke tiu urbo estas konstruita sur sep montetoj... En la piedira zono troviĝas verŝajne la plej impresa vidindaĵo de la urbo. Fronte al la

Malnova Urbodomo kun ĝiaj regionhistoria kaj ŝua muzeoj leviĝas *Schlossplatz*, la grandega kastelŝtuparo kun la kastela fontano (*Schlossbrunnen*). La nova kultura centro de la urbo Pirmasens estas Forum *Alte Post*. Tie en la plene restaŭrita "Reĝa Bavara Poŝtoŝtacio" okazas ŝanĝiĝantaj artaj ekspozicioj, seminarioj, koncertoj kaj aliaj kulturaj okazaĵoj. De dek jaroj, en la iama plej granda ŝufabriko de Pirmasens, *Rheinberger*, troviĝas la unua scienca centro de Rejnlando-Palatinato. Tiu interaga muzeo *Dynamikum* ofertas pli ol 160 eksponaĵojn por tuŝi kaj elprovi.

INTERNACIA VESPERO

Dimanĉe la 20-an de majo okazis en la granda salono de la kongresejo la Internacia Vespero. Malfermis la spektaklon la Internacia Koruso Z-M-O kiu ĉarmis la spektantojn kantante en pluraj lingvoj el kiuj Esperanto. Sekvis la artaj prezentoj de la Danca Studio « Oriento de Elmira ». La grupo prezentis plurajn dancojn kaj belajn kaj diversajn kostumojn kun multaj dan-

cistinoj el diversaj aĝoj de knabinoj ĝis plenkreskuloj. Vere, oni diru ke tiu danca studio estas unu el la plej ekzotaj dancgrupoj el la regiono. Por la plej granda feliĉo de la spektantoj, la dancgrupo kaj la koruso prezentiĝis alterne sub formo de unu danco, unu aŭ du kantoj. Memkompreneble, tio multege vigligis la unuan parton de tiu internacia vespero. Kiel tria parto de la vespero, la grupo « La kompanoj » kantis kantojn de Jacques Brel en Esperanto. Ne plu necesas prezenti « La kompanoj », ne-fiksitan kunularon naskitan kadre de la asocio Esperanto-Gironde. La grupo kunigas amatorajn artistojn por muzikaj kaj teatraj spektakloj. Ni memoru pri « Brel kaj la Gigantoj » dum la nacia vespero de la 100-a UK en Lille. Ĉi-vespere kantis Pjer (gitaro, banĝo, voĉo) kaj FaMo (voĉo kaj akordiono). Bela vojaĝo tra la mondo dank'al la ekzotaj dancoj, la kantoj en diversaj lingvoj, sen forgesi la faman artiston Brel. Mirinda vespero lerte animita fare de Martin Thorenz, kiu ankaŭ gvidis la ekskurson al Pirmasens.

Raymonde Coquisart

SINTEZA RAPORTO

LA TURNEO DE ZDRAVKA METZ KAJ NORMAND FLEURY

Zdravka kaj Normand prelegvojaĝis de la 1a ĝis la 16a de majo. Ĉiuj vizititaj kluboj lokiĝas en la nordokcidenta parto de Francio, nome: Amiens, Tours, Le Mans, Nantes, Douarnenez, Plouezec, Saint-Malo, Rennes kaj L'Aigle.

Zdravka proponis prelegon pri sia propra sperto kiel migrinto de Kroatio al Kanado dum Normand faris profesion analizon pri la rilato de la homaro kun la arbaroj. Ambaŭ temoj estis preskaŭ ĉie prezentitaj. « Kvankam tre malsamaj, ili plaĉis » skribis Amiens, Le Mans. Ĉiuj kluboj laŭdis la klaran kaj facile kompreneblan stilon de la du prelegantoj (Nantes: « eĉ la komencantoj bone komprenis »). Ankaŭ rimarkinda estis la diaporamo de

Normand (Tours) pri la nuna situacio de la arbaroj kaj kion fari por protekti ilin, t. e. nin protekti.

Talentaj, atentemaj, afablaj (ĉiuj kluboj), Zdravka kaj Normand respondis al multaj demandoj de la publiko. Publikaj kunvenoj okazis en Tours, Le Mans, Nantes kaj Saint-Malo. Rennes kaj Amiens organizis enkluban aranĝon. Douarnenez vizitigis, kun interveno de Zdravka, la Solidaran Domon en Kermarron. En Plouezec, la prelego de Normand okazis dum tradicia esperantista pikniko. En L'Aigle, kunvenis la normandaj esperantistoj okaze de sia Ĝenerala Asembleo. Entute ĉeestis, proksimume, 140 esperantistoj kaj 50 ne-esperantistoj. La gazetaro ne raportis pri la publikaj aranĝoj, kelkloke nur aperigis anoncon.

Estus tro longe, raporti pri la renkontiĝoj, vizitoj kaj vespermanĝoj kiujn proponis la lokaj kluboj. Ni tamen notu la viziton al Gaby Tréanton, nun 98 jaraĝa. En L'Aigle, Normand ĉeestis prelegon de loka historiisto pri la migrado de normandianoj, de la regiono Perche al Kebekio. Li ricevis kelkajn informojn pri patrino praavo.

Senhezite, ni diru, ke tiu turneo tre plaĉis al la kluboj, la lokaj esperantistoj, la publiko. La kluboj kontentige interŝanĝis por sukcese preterpasi trajnaj malfacilaĵojn. Je la fino de la normanda aranĝo, Normand sin deklaris preta por nova turneo en 2019. Tio ne falis en surdan oreilon...

Yves NICOLAS

Prelegvojaĝo

SINTEZA RAPORTO PRI LA TURNEO DE GEORGI MIĤALKOV (Julian Modest)

De la 28a de majo ĝis la 23a de junio, Georgi Miĥalkov rondvojaĝis nome de Espéranto-France. Li vizitis grupojn en Parizo (sidejoj de EF kaj de Sat-Amikaro), Bruselo, Strasbourg, Lyon, La Ciotat, Montpellier, Ariège, Toulouse, Périgueux, Brive, Limoges kaj Châteauroux.

Georgi, ne tre vojaĝema, iom timis tiun unuan restadon kaj longan veturadon en Francio, kaj ni mem esperis, ke ĉio estos en ordo malgraŭ anoncita striko de la fervojistoj. Efektive la kluboj inter si tre bone komunikis kaj solvis ĉiujn veturajn obstaklojn, neniu grava mispaŝo okazis.

La kluboj elektis kiel prelegtemojn « Nuntempa bulgara artkulturo » (6 foje), « Urboj de Nigra Maro » (4 foje), Historio de Bulgario (3 foje) Esperanto

literaturo (3 foje) sed dum tiuj prelegoj ofte venis tre diversaj demandoj, notinde pri la nuna vivo en Bulgario. Kiel bone resumas Lyon, « La temo, Bulgario, estis tre nova por ni ». En sia propra raporto, Georgi skribis, ke « tre malmultaj inter la francoj konas

Bulgarion ». La publiko ĝenerale tre ŝatis la prelegojn. « Publiko tre atenta » (Strasbourg), « Prelego tre interesa » (Lyon, Brive), « ni lernis multon pri



Bulgario danke al li » (Limoges). « Tre klaraj prezento kaj parolado » (Périgueux) dum Lyon konfirmis « Parolis li tre klare kaj verve ». La kluboj elektintaj la temon

« Urboj de Nigra Maro » tamen preferintus samtempan prezentadon de la fotoj kaj de la komentoj por preterpasi

« prelegon abstraktan » (Bruselo), la sola loko kie «li ne vere sukcesis kapti la aŭskultaran atenton ».

Fama verkisto en Esperantujo (« Domaĝe, ke li ne proponis prelegon pri siaj propraj verkoj. Certe, Georgi estas tro modesta », Parizo), li vendis librojn okaze de diversaj prelegoj « la ok ekzempleroj de 'Murdo en parko' vendiĝis en nia urbo » (Lyon) kaj interŝanĝis pri sia arto diversloke, notinde en Ariège kie aperis interesaj artikoloj en « La Dépêche » (Mirepoix) kaj « Le petit journal ». « Tre sukcesa renkonto » notis tiu klubo.

Bedaŭrinde, neniu alia artikolo en la aliaj urboj. Toulouse filmis lin dum prelego kaj publikigos tiun filmon kun subtekstoj en la franca (bona ideo kiu parte respondas al la demando de Lyon

kiu volus « interŝanĝi konsilojn pri kiel rilati ekster la movado »). Strasbourg okazigis la prelegon en kooperativa kafejo, La Ciotat en Cira kaj Grand Portique, Toulouse en asocia kafejo dum Brive kunlaboris kun loka kulturdomo. En Châteauroux la prelego estis en « Maison des droits de l'enfant (domo de la infanaj rajtoj) ». Georgi intervenis en kulturejo 'Le Léo' (eksa Foyer Léo Lagrange) de Foix.

Laŭ la klubaj raportoj, Georgi renkontis iom pli ol 200 esperantistojn. La publiko ne esperantista videble malmultis (proksimume 30 homoj, laŭ la raporto de nur 4 kluboj) sed la kontaktoj eble fruktodonas kiel en Banat (Ariège) kie okazis verkista renkontiĝo (plurlingva deklamado de poemoj kaj interŝanĝo de libroj kun « organizantino de 'Festi'scrib' kiu petis E-atelieron por sekva okazaĵo ».

Ĉiuj kluboj notis, ke nia amiko estas « interesa », « agrabla », « afabla », « absolute ĉarma ». Sialflanke, Georgi skribis, ke « la afableco de la gastigintoj kortuŝis min » kaj ni lasos lin konkludi :

« Mi ne scias ĉu en aliaj landoj la esperantistoj organizas similajn rondvojaĝojn sed, laŭ mi, la franca turneo estis tre utila ne nur por mi sed same por la francaj esperantistoj kiuj havis eblecon pli bone koni Bulgarijon, la originalan E-o literaturon kaj praktiki la lingvon. Tiu ĉi rondvojaĝo ankoraŭfoje montris al mi, ke E-o estas la plej unika lingvo en la mondo ».

Prave, Georgi ! Dankon al vi kaj al la samideanoj kiuj akceptis vin.

Yves NICOLAS

UK

ELSTARAJ AGANTOJ DIPLOMITAJ EN LISBONO

En la Solena Fermo de la 103-a Universala Kongreso en Lisbono estis anoncigitaj la nomoj de 14 ricevantoj de Diplomo pri Elstara Agado kaj de Diplomo pri Elstara Arta Agado. Inter tiuj pluraj francoj estis premiitaj.



Diplomo pri Elstara Agado:

François Lo Jacomo, matematikisto, membro de la Akademio, pro la multjara reprezentado de UEA ĉe Unesko en Parizo, inter alie kiel ĉeforganizanto de la ceremonio de la 11-a decembro 2017.

Aldone li ricevis la duan premion en la branĉo « prelegoj » de la konkurso Premio Pirlot de AIS por la prelego Primmombroj (IKU 2017).

Diplomo pri Elstara Arta Agado:

Fabrice Morandea «FaMo», pro la elstara kontribuo al la muzika Esperanto-kulturo, kiel akordion-ludanto, kantisto, aktiva membro de la Kompanoj kaj inter



alie pro la ĵus lanĉita albumo «Brel en Esperanto».

Cyrille Poulet «Platano», pro la elstara kontribuo al la repstila Esperanto-muziko, inter alie per la eldono de la unua hiphopa KD en Esperantio, en la duopo La Pafklik, kaj la daŭra aktiveco unuope, sub la artistana nomo Platano.

(Info: UEA)



Lucien Giloteaux (1929-2018)

Kun bedaŭro mi sciigas vin, ke mia patro Lucien Giloteaux forpasis la 3an de novembro, 89-jara. Li lernis Esperanton en 1947, do antaŭ 71 jaroj! Dum la tuta vivo li estis tre aktiva Esperantisto. Li konatiĝis kun mia patrino dank' al Esperanto, li foje instruis Esperanton, sed li plej ŝatis verki artikolojn. Li ofte kontaktis la lokajn ĵurnalojn kaj ankaŭ kunlaboris kun Heroldo de Esperanto. Li multe vojaĝis. Lia unua Universala Kongreso estis en 1950, kaj poste li partoprenis multegajn kongresojn kaj renkontiĝojn. Lia lasta Universala Kongreso estis tiu en Lille en 2015, en kiu ankaŭ mi partoprenis. Ĉi-kune foto de mia patro kun lia tre ŝatata skribmaŝino. Se vi deziras aŭskulti mian patron, spektu tiun filmeton, kiun mi faris en Aŭstralio en 2009 : <https://www.youtube.com/watch?v=GCiQ5sDqic>

Nicole Else

Renata Chassard (1937-2018)

Post la UK en Lille mia fratino Renata estis laca. En julio 2018 ŝi eniris maljunulejon en Béarn, kie loĝas ŝia filino. Sed la 21an de septembro ŝi ne vekigis. Mia fratino partoprenis en multaj UKoj. Ŝi aktivadis inter radioamatoroj. La alta anteno en Foulayronnes (47) estas malmuntita. Ŝiaj amikoj en la tuta mondo ne plu aŭdos ŝian ridon.

Jacques Caubel



Luiza Marin (1923-2018)

Louise MARIN estis ĉefdelegito de UEA por Francio dum multaj jaroj kaj persone konis ĉiujn delegitojn. Instruistino en baza lernejo laŭ Freinet-metodo, ŝi kunlaboris ĉe ICEM-Esperanto, kaj kiam ŝi emeritiĝis, ŝi deĵoris en la sidejo de Esperanto-France kvazaŭ profesia sekretario. En la UK en Montpellier ŝi gvidis la teamon de deĵorantoj. Ŝi plu estis delegito de UEA ĝis la forpaso! Ĉu rekordo?

Renée Triolle, ĉefdelegito de UEA por Francio

Lorsque Susanna nous a informés du décès de Luiza j'ai senti une grande peine. Et je tiens à la remercier, du fond du coeur, pour toute l'aide qu'elle m'a apportée. Depuis plusieurs années je m'intéressais à l'espéranto; j'avais appris pratiquement seule, -surtout avec la méthode Assimil dont j'apprécie la méthodologie. Je me suis aperçue qu'il me manquait la pratique de la langue. Je suis allée au siège de l'association et me suis inscrite à la *babila rondo* du lundi. Cette séance était animée par Luiza et Materna. Je comprenais assez bien les intervenants. Mais je n'étais pas très loquace. Luiza a fait le maximum pour favoriser ma prise de parole. Merci Luiza. Je vous dois beaucoup.

Madeleine Crépatte



Ginette Martin (1938-2018)

Preskaŭ hazarde mi eksciis pri la forpaso de Ginette Martin, lunde la 3an de decembro. Ŝi estis 80-jara.

Ginette havis multajn meritojn pri Esperanto, ŝi klopodadis varbi kaj instrui la lingvon en sia ĉirkaŭaĵo, sine de orientfranca Esperanto-Federacio. Ŝi kreis grupon en Gérardmer (88), kien ŝi invitis plurfoje prelegantojn el diversaj landoj.

Sed ŝia alia ĉefa merito estas, ke ŝi kuraĝe entreprenis la tradukadon de esperantaj verkoj por konigi ilin al la franclingva publiko: *La Zamenhofstrato (La rue Zamenhof)*, *Kroata milita noktlibro (Journal de nuit)*, *Flugi kun kakatuo* (*Comme un vol d'oiseaux sacrés*), *La ŝtona urbo (La ville de pierre)*, *Kiam mi estis la plej feliĉa en mia vivo*. Kaj mi konstatis, ke ankoraŭ tute lastatempe ŝi estis okupata pri la tradukado de la raportoj de HORI Jasuo pri Fukuŝima kaj la sekvoj.

Ĝis 2018 ŝi partoprenis en diversaj kongresoj kaj kunvenoj, enlande kaj eksterlande, laste en Lisbono. Daŭre ŝi raportis pri tiuj kunvenoj en la regiona bulteno La Informilo.

Claude Nourmont

Historio

Historio de la Akademio de Esperanto,

de Carlo Minnaja, *eld. Itala Esperanto-Federacio, Milano, 2018, 314 p., 17 x 24 cm, ISBN 978 88 96582 23 7*

Jen grava libro. Ĝi nepre estu legita kaj poste restu sur la bretaro, ĉiam facile atingebla, de ĉiu serioza esperantisto apud la libroj, kiuj ebligas trovi ĉion, kio estas grava pri, por kaj pro Esperanto. Per tiu libro, kiel estro de la Komisiono pri Historio de la Akademio de Esperanto, la aŭtoro bonege plenumis sian takson.

Kvazaŭ Akademio estus vivanta homo

Temas pri ia biografio, kvazaŭ Akademio estus vivanta homo, kiu naskiĝis en 1905 kaj ankoraŭ nun bone fartas. Fakte ia aŭtobiografio, verkita ene de la Akademio, iasence la Akademio skribis pri si mem, ĉar la aŭtoro estas membro de la Akademio ekde 1973, denaska esperantisto ekde 1940 kaj multege verkis, tradukis en kaj el Esperanto kaj agis por Esperanto.

Doktoro pri matematikaj sciencoj kaj pri historio, profesoro ĉe diversaj universitatoj italaj kaj usonaj, Carlo Minnaja havas prestiĝan kaj plenplenan vivo-resumon, kiu garantias profesian historian laboron. La kvara paĝo de la kovrilo konvinkas nin, ke verŝajne estus tre malmultaj aliaj homoj, kiuj povus tiom kompetente kaj sperte verki tiun libron.

Malgraŭ tiom da kompetentecoj, Carlo Minnaja plene sukcesis verki, ne nur historian libron sed verkon legeblan kiel romanon. Legante la libron, mi ĝuis ke la aŭtoro estas ankaŭ homo kun koro kaj sentoj. Li mem enkonduke anoncis: "Historiisto, male al kronikisto kiu nur registras faktojn, klopodas ankaŭ interpreti ilin kaj elmetas proprajn konsiderojn."

Ĉu trankvila ripozejo?

Ne imagu, ke la Akademio estas trankvila ripozejo. Okazis kvereloj, debatoj kelkfoje malserenaj, personaj konfliktoj, malafablaj kritikoj de interne kaj de ekstere. Kiel en bona romano, ne sen suspenso, la aŭtoro sukcesis fari el tiaj okazaĵoj aventurojn, kiuj ofendis kelkajn homojn, sed fine ne nocis al Esperanto, kaj eĉ kelkfoje profitis al nia kara lingvo danke, ekzemple, al

utilaj klarigoj. En 1989-1990 iu konsideris, ke la Akademio troas pri neologismoj, lingvistikaj teorioj, ktp. kaj pro tio proponis, en letero kiu aperis en revuoj, "Kontraŭakademion" de veraj parolantoj. Tio vekis ŝokon kaj oni taksis tion danĝera, kaj la libro rakontas kiel digne oni mastrumis tiun krizon. La persono, kiu okazigis la krizon nun estas ano de la vera (do ne la kontraŭa) Akademio.

Finfine, kion do faras la Akademio?

En la sama epoko, la tiama redaktoro de la UEA-revuo Esperanto publikis en ĝi artikolon, kiu enhavis la frazon: "finfine, kion do faras la Akademio?" La demando provokis akran polemikon. Ĉu vi scias kiu tiam estis la redaktoro de la revuo Esperanto? Kiam vi malkovros la respondon, vi vidos ke tiu mispaŝo ne malebligis al la redaktoro fariĝi prezidanto de UEA, sed tamen pli ol dudek jarojn poste.

Okazis pli grandaj bataloj, ekzemple pri "ata/ita" (participoj) aŭ "-io/-ujo" (landnomoj), kiuj daŭris, daŭris ... eble daŭros. Sed la aŭtoro bone priskribis la problemojn, tiamaniere ke se vi celu fariĝi fakulo pri tiaj aferoj, vi nun posedas bonegan historian bazon. Malgraŭ tiom da kvereloj, oni konsoliĝu per la fakto ke la esperanto-popolo vere amas la Akademion. Tion atestas la ĉiama bonega partoprenado en la publikaj akademiaz prezentoj dum la UK-oj.

Historio kaj referencoj

En la libro mi distingas du partojn. En la unua, de 190 pagoj, post enhavo-tabelo kaj antaŭparolo de John Wells, dojeno de la Akademio, la aŭtoro agrable rakontas la historion de la Akademio. Li eĉ - en la unua ĉapitro - priskribis la prahistorion de la Unua Libro (1887) ĝis naskiĝo de la Lingvo Komitato (1905). Sekvas 12 ĉapitroj de la Unua Universala Kongreso (1905) en Bulonjo, Francio, ĝis nun. Fakte la

historio de la Akademio estas la historio de Esperanto mem vidita de la Akademio.

La dua parto, en 124 paĝoj, bonege riĉigas la verkon kaj faras el ĝi bonan traktaĵon, kie oni trovas: referencojn; listojn de personoj apartenintaj al la Lingvaj Institucioj tra la jaroj, de konsisto de la Lingvaj Institucioj en la diversaj jaroj; liston de la prezidantoj de la Lingvaj Institucioj; liston de la verkoj premiitaj de la Akademio; bibliografion, indeksojn de personoj, temoj, verkoj, revuoj, eldonejoj, lokoj kaj bildoj.

Zamenhof, kia genio!

Mi neniam enuis legante la libron kaj ofte pensis: Zamenhof, kia genio! Li ne nur kreis kaj donacis la lingvon, kaj ankaŭ proponis al ni du gravajn ilojn, la Fundamento kaj la Akademio. Danke al ili Esperanto restas vivanta lingvo pli ol cent jaroj post

la forpaso de Zamenhof. Mi ŝatis legi pri la granda kaj la eta historio, pri la lingvaj kaj personaj konfliktoj. Kelkfoje la etoso ne estas ripoziga ĉe la Akademianoj. Sed se oni konsideras la tutan historion, estas nur unu konkludo: la Akademio bone laboras kaj estas grava institucio por la vivo mem de Esperanto.

Sendube la libro *Historio de la Akademio de Esperanto* estas, kaj restos, utila kaj grava por instruistoj, kleruloj kaj sciencistoj. Ĝi estas bona ilo, por kiu volas ion serĉi simple por la plezuro de mem-klerigado, aŭ por intelekta, eĉ scienca, laboro. Ĝi estas fonto por trovi laborkampojn kaj temojn por disertacioj.

Al la mezaj esperantistoj, mi diru, ke se vi ne kutimas legi tiajn librojn, ĝi povus esti iom malfacila en la komenco, sed se vi ne tro rapide forlasas la libron, vi sufiĉe rapide alkutimiĝos al la lerta stilo de Carlo Minnaja. Legante tiun libron oni vere perfektigas pri la lingvo kaj ankaŭ pri la historio de la lingvo kaj de la movado.

Bernard Behra



Humure

Surprizeto

En lastatempe aperinta libro de Amélie Nothomb, *La bouche des carpes, entretiens avec Michel Robert*, p. 127:

- Vos livres sont aujourd'hui traduits dans bon nombre de pays d'Europe et d'ailleurs, que ce soit en tchèque, hongrois, chinois, portugais du Brésil, danois ou même en espéranto!

- Il y a, pour cette dernière langue, une anecdote amusante. Mon éditeur espérantiste est fermier dans l'Allier et m'a informée que j'étais le troisième auteur de son catalogue...après San Antonio et le marquis de Sade!


La eldonisto estas fakte la tradukinto Ĵak Le Puil, kiu ne estas farmisto sed artisto, kaj cetere ne estas en Allier sed en Cher. Kaj en lia katalogo estas multaj aliaj verkistoj (sed oni citas nur la tradukojn el francaj verkistoj). Eldonejo estis en Pollando...

Muziko

Jen la plej freŝaj novaĵoj okazintaj ĉe **VINILKOSMO!**

Dum la jaro 2018, Vinilkosmo aperigis 6 novajn albumojn! Cetere ni poluris nian retejon, vinilkosmo-mp3.com por pli facila

uzado! Ni rememorigas al vi ke ĉiuj eldonaĵoj troveblas en ajna formato (inkluzive KD-formate) ĉe nia nun sola retejo vinilkosmo-mp3.com



Muziko

Muzika aktivado de **VINILKOSMO** kompromitita!!!

Tre bedaŭrinde ni konstatis gravan malkreskon de la intereso al esperanto-muziko en la jaro 2018 kun gravaj konsekvencoj... tio estas ege malmultaj diskovendoj, sed ankaŭ ege malmultaj elŝutaj vendoj.

Paralele pli kreskis la elsendflua aŭskultado sed tre bedaŭrinde ĝi ne sufiĉe pagas por vivtenigi la eldonejon. Pro tio estis kreita la **ABONKLUBO** kiun ni vidis kiel alternativon helpe de la justa elsendfluejo (Divercities Music) por pludaŭrigi la muzikproduktadon kaj eldonadon. Sed tre bedaŭrinde post tri jaroj da ekzisto ni devas konstati ke ankaŭ la **ABONKLUBO** malsukcesas.

Videble homoj preferas daŭre aŭskulti muzikon senpage en aliaj retejoj. Vinilkosmo provos ankoraŭ elteni unu plian jaron sed se en 2019 ne inversiĝos la situacio kaj ne multobliĝos abonantaro de la **ABONKLUBO** kaj la uzantaro de Divercities Music, **Vinilkosmo devos fermi.**

Konsekvencoj de la fermo de Vinilkosmo estos jenaj:

- tuja malapero de la katalogo de Vinilkosmo en la reto.

- **malaperos** la ebleco de **regula muzikproduktado**, eldonado de novaj albumoj de artistoj, aŭ reeldonoj de malnovaj albumoj. Esperantistoj devas konscii ke ne eblas uzi kaj aŭskulti

Esperanto-muzikon sen subteni ĝin pli aktive kontribuante por ke ĝi pluviu.

Do konklude kaj praktike, **la nura alternativo por eviti fermon de VINILKOSMO estas ke ĉiuj homoj kiuj volas daŭre povi aŭskulti Esperanto-muzikon (el la katalogo de Vinilkosmo) aliĝu al la ABONKLUBO.**

Sen tio, en 2020 tute malaperos la muzik-katalogo de Vinilkosmo el la interreta pejzaĝo.

Dankon pro via atento kaj via subteno !

La tuta teamo de Vinilkosmo
<https://www.vinilkosmo-mp3.com/eo/vinilkosmo-abonklubo/abonoj-abonklubo.html>

Raporto

Vojaĝo al malpermesitaj urboj

A Ankorau troviĝas neloĝeblaj urboj en Fukuŝima

La 20an kaj la 21an de novembro ni, apartenantaj al kontraŭnuklea movado en mia gubernio Gunma, vojaĝis al la marborda regiono de Fukuŝima, kie estas 10 nukleaj reaktoroj. TEPCO decidis forĵeti ĉiujn 10 reaktorojn, ĉar ĝi antaŭvidis, ke ĝi ricevos subtenon nek de la gubernio nek de ĉiuj 59 komunumoj.

Ni trapasis la urbojn Futaba kaj Ookuma, kie estas tiuj difektitaj kvar reaktoroj. Eĉ en buso la ciferoj, kiuj montras fortecon de radioaktiveco, pli kaj pli grandiĝis al preskaŭ 3 mikrosivertoj (oni ne rajtas loĝi en lokoj pli poluitaj ol 0,23 mikrosiverto). Laŭ la nacia vojo n-ro 6 troviĝis forgesitaj domoj, oficejoj, vendejoj, apartamentaroj fermitaj per bariloj kaj kampoj kovritaj de herboj. La eksaj loĝantoj loĝas ie en la tuta Japanio, jam perdinte esperon reveni al sia hejmo. La urbaj administracioj translokiĝis al aliaj urboj kaj strebas restarigi la urbon, sed tio estas malfacila.



Gimnastikejo de la mezlernejo Tomioka. Restas vivsignoj de rifuĝintoj post la katastrofo. Sur la podio estas panelo de kursfina ceremonio kun flagoj japana, urba kaj lerneja.

Novaj enloĝantoj

Ni vizitis ankaŭ la urbojn Tomioka kaj Naraha, en kiuj estas permesite por eksaj loĝantoj reloĝi, sed en efektiveco revenis malmultaj homoj. La urboj klarigas, ke pli ol 40% de la urbanoj revenis, sed en tiu proporcio estas multaj novaj enloĝantoj, nome laboristoj por la reaktoroj, do oni supozas, ke nur 30% de la eksaj loĝantoj (preskaŭ ĉiuj estas maljunuloj) revenis. Apud la forĵetita mezlernejo ni renkontis promenantan maljunulon 90-jaran, kiu diris, ke antaŭe tie loĝis pli ol 100

familioj, sed nun nur 3. Li loĝas kun sia edzino. Dum multaj tagoj li interparolis nur kun sia edzino, do li estis ĝoja renkonti nin. Per aŭtomobilo li iras por aĉeti necesaĵojn, sed ĝis kiam li povos vivi tiamaniere?

Anstataŭ eksaj loĝantoj venis novaj loĝantoj, kiuj laboras por la nukleaj centraloj. Por ili konstruiĝis kun monhelpo de la registaro multaj apartamentaroj. La eksaj loĝantoj estas malkontentaj pro tio, ke la urbo ŝanĝiĝis kaj perdis la eksan amikan etoson.





Novaj distriktoj

En la urbo Naraha oni konstruis novan distrikton “Emi-ful Town” (Urbon plenan de ridoj) por loĝantoj, precipe por maljunuloj. Kiel tiu viro en Tomioka, ĉefe revenis maljunuloj, kaj ili devas loĝi dise en diversaj lokoj. Tio estas tre maloportuna por tiuj maljunuloj, kaj ankaŭ por la urbo, kiu devas zorgi pri ili. Tial la urbo konstruis loĝkvartalon por ili, invitinte vendejojn. Sed ankoraŭ estas multaj liberaj terenoj sen domoj. Ĉu eksaj loĝantoj volas kaj povas loĝi en tiu nova kvartalo, forlasinte sian eksan domon kaj aĉetinte novan domon?

Panelo de la urba deklaro

Antaŭ la gimnastikejo de la mezlernejo Tomioka staris panelo de la urba deklaro. Ĝi tekstas jene:

1. Ni faru la urbon plenan de floroj kaj verdaĵoj.
2. Ni zorge vartu infanojn por nia estonteco.
3. Ni ĉiuj diligente lernu kaj faru la urbon plenan de espero.
4. Ni laboru ĝoje kaj faru la urbon plenan de energio.
5. Ni prizorgu unu la alian kaj faru la urbon plenan de varma koro.
6. Ni observu la regulojn kaj faru la urbon plenan de agrableco.

(Deklarita en julio 1984)



La nuklea reaktoro n-ro 1 de la nuklea centralo n-ro 2 de Fukuŝima ekfunkciis en aprilo 1982 kaj la nuklea reaktoro n-ro 2 ekfunkciis en februaro 1984. Certe, kiam kleraj urbanoj preparis tiun deklaron, ili vidis prosperon dank’ al la nuklea centralo situanta en sia urbo. Ŝajnis, ke tiu prospero daŭros. Ŝajnis, ke ili elektis la ĝustan vojon, akceptinte la nuklean centralon, tamen ili eraris. La nuklea akcidento momente detruis multjaran klopodon de la urbanoj por la brila estonteco. Nun en la urbo malo okazas, kaj ĝi okazos preskaŭ eterne.

HORI Jasuo

Esperanto

kongreso en Dovro, 12an–16an de Aprilo 2019

<https://esperanto-france.org/kongreso-2019>

